

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 305 (72) - KVINA EPOKO

DECEMBRO 1998



## Manresa

NIA VENONTJARA KONGRESURBO



ASSOCIACIÓ  
CATALANA  
D'ESPERANTO



KATALUNA  
ESPERANTO-  
ASOCIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo

Peranto de UEA, FEL, *Literatura Foiro*, IKEL, *La Kancerkliniko*, *La Dua Jarcento (IEM)*, *Litova Stelo*

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental)  
Catalunya/Katalunio

Tel + Fakso: 93 - 716.36.33, (ekde lundo ĝis vendredo inter la 17a kaj 20h.).

Ret - adreso: kea@stel.net

Ret - paĝo: <http://www.stel.net/esperanto/kea>

**Kotizoj por la jaro 1998:** Individua Abonanta Membro 3.500 p-toj; Individua Subtenanta Membro 7.000 p-toj; Individua Dumviva Membro 70.000 p-toj; Kolektiva Membro 7.000 p-toj; Juna Membro 2.500 p-toj.

**Banko:** Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona - Agència 461 Sabadell.  
Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

**Plenumkomitato de KEA:** Prezidanto: Llibert Puig; Vicprezidanto: Josep Franquesa; Ĝenerala Sekretario: Xavier Rodon; Kasisto: Òscar Puig; Komitatanoj: Lluís Armadans, Arnald Massanas, Paco Belmonte, Felip Artero, Lluís Aragay, Mercè Porta, Luz Vázquez, Sun Farràs.

**Kontrola Komisiono:** Èric Collignon, Bartomeu Costa, Ramon Perera

**Kataluna Esperantisto:** Pere Bernús, Llibert Puig, Carles Berga, Xavier Rodon, Luz Vázquez.

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

**Kataluna Esperanto-Junularo:** Apartat 32.318 - 08080 BARCELONA

Impres a/Presita ĉe: Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 - 725.50.91

Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Jordi Solé / Camardans

# Delfi Dalmau Katalunismo, liberantismo kaj esperantismo



*Delfi Dalmau*

La Suplemento de  
**KATALUNA  
ESPERANTISTO**

ALIGILO

## BERLINO

Konstanta adreso:  
84-a UK de Esperanto  
Nieuwe Binnenweg 176  
3015 BJ Rotterdam  
Nederlando



84-a UNIVERSALA  
KONGRESO  
DE ESPERANTO  
31 julio - 7 aŭgusto 1999  
Berlino, Germanio

Kongresa numero:

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ: (ĉiuj en nederlandaj guldenoj)	ĝis 98 09 30 1-a periodo		ĝis 98 12 31 2-a periodo		ĝis 99 03 31 3-a periodo		ekde 99 04 01 4-a periodo	
	A	B	A	B	A	B	A	B
1. ne individua membro de UEA	295	225	370	280	445	335	520	390
2. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG):	235	180	295	225	350	270	410	315
3. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA:	180	135	225	170	270	200	315	235
4. komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA	118	90	150	112	175	135	205	155

KEA: Oficiala peranto



## ESPERANTO-KURSO EN MEZLERNEJO

La 9-an de decembro komenciĝis ĉe IES Serrallarga en la marborda urbo Blanes, plene oficiala tri-monata E-kurso gvide de la loka aktivulo kaj reprezentanto de ILEI, s-ano Pedro M. Martin, instruisto pri fremdaj lingvoj en tiu sama mezlernejo. Temas pri unu el la tiel nomataj *variaj kreditoj*, devige elekteblaj stud-objektoj, kiujn mezlernejoj ofertas por ke geknaboj elektu inter ili.

Surbaze de *Tendaraj Tagoj 1 kaj Mazi en Gondolando*, entute sep gelernantoj inter 14-kaj 16-aj jaraj (iom malpli ol la averaĝa nombro por tiaj kursoj) nun kontentige lernas Esperanton dum tri horoj semajne kaj ĉe la fino ili ricevos oficialan noton.

La propono kaj organizado de la kurso trovis nenian kontraŭstaron, nek ĉe la edukaj instancoj nek ĉe la lernejoj.

Gratulon al nia aktiva membro en Blanes.

## INTERNACIA KUNLABORO ĈE BIBLIOTEKOJ

(1) Ni ricevis peton de s-ro Johan Van Eenoo, prezidanto de la Bruĝa E-Klubo kaj vicprezidanto de Flandra E-Ligo, laŭcele liveri informojn pri la kataluna verkisto Joaquim Rubió i Ors, ĉar la Urba Biblioteko deziras organizi dum 1999 grandan ekspozicion pri la fama flandra pastro-poeto Guido Gezelle (1830-1899), okaze de la centa datreveno de lia morto. La peton pravigas la fakto ke Guido Gezelle kaj Rubió i Ors havis regulajn kontaktojn. Ambaŭ batalis por la revivo de la popola lingvo (flandra/kataluna). En la tiea biblioteko ili retrovis inviton al la "Jochs Florals" (Floraj Ludoj), kiun Rubió i Ors sendis al Gezelle.

Nia asocio tre volonte sendis informojn kaj foton de nia eminenta kataluna verkisto.

(2) Ankaŭ ni ricevis peton de la kataluna biblioteko ĉe la Universitato "Johann Wolfgang Goethe" en Frankfurt am Main (Germanio) donaci librojn en la kataluna pri Esperanto por riĉigi tiun bibliotekon jam kun 28.000 volumoj laŭ informo de ties gvidanto, la elstara lingvisto Prof. D-ro Tilbert Dídac Stegmann. Nia asocio kompleksis tiun peton per sendo de la biografio de D-ro Zamenhof kaj de la vortaro E-kataluna.

## BROŜURO PRI DELFÍ DALMAU

Temas pri esperantlingva eldonaĵo en formato A-5 kun 20 paĝoj kaj forta kovrilo kiu prezentiĝas kiel tria suplemento de Kataluna Esperantisto. La teksto laŭ la kataluna originalo de Jordi Solé i Camardons kaj traduko en E. de nia ĝenerala sekretario Xavier Rodon laŭ la titolo "Katalunismo, liberanismo kaj esperantismo", estas tiu de la prelego de la aŭtoro okazinta en Figueres, la 3-an de majo 1997, enkadre de la 28-a Kataluna kaj 1-a Transpirenea Kongreso de Esperanto. La verko krome elstaras ĉar ĝi montras diversajn ĝis nun neeldonitajn fotojn kaj desegnaĵojn de la omaĝito. (La broŝuron nia asocio sendos al ĉiuj siaj membroj donace).

## 50-a DATREVENO

Tutmonde oni celebras la 50-an datrevenon de la Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj nia asocio volas tion ankaŭ memori al siaj membroj kaj legantoj, ĉar ankoraŭ estas longa irenda vojo tiucele. Post duonjarcento de la proklamo de la fama Deklaracio, ĉu la nuna situacio povas kontentigi nin? Tute certe ne!. Kiom da landoj strikte observas tiujn bonintencajn principojn? ĉu multaj, malmultaj aŭ neniu? Mem pripensu kaj konkludu!.

Se vi ŝatus legi la Deklaracion en Esperanto, nia asocio volonte kaj senpage povas disponigi ĝin al vi.

## NIA VENONTA KONGRESO EN MANRESA

La 29-a Kataluna kaj 2-a Transpirenea Kongreso de Esperanto, okazos en Manresa dum la tagoj 30-31 de oktobro kaj 1 de novembro 1999. En la estonta revuo ni aperigos ampleksan informon pri la venonta kongresurbo kaj aliĝilon.


Retrospektive ni memoru ke en Manresa okazis nia 18-a Kataluna Esperanto-Kongreso en 1936, la lasta Kongreso antaŭ la hispana intercivitana milito.



## LIBROSERVA KATALOGO

Finfine nia asocio disponas pri aktuala libroserva katalogo, kiu de tempo al tempo estos ĝisdatigita surbaze de nia datumbazo. Inter du eldonoj, ni informos pri novaj eldonaĵoj sur la paĝoj de nia revuo. La katalogon nia asocio nun dissendas al ĉiuj siaj membroj kaj kunlaborantoj.

## KORESPONDADO



Konga samideano 38-jaraĝa, 1'74 mt. alta, deziras korespondi kun katolika hispana fraŭlino. Li celas viziti nian landon vintrofine. Eventualaj korespondantinoj rekte sin turnu al li laŭ jena adreso: MAYOMA-DIANKEMBO - B.P. 152-Kinshasa-7 KINSHASA (Kongo, Demokratia Respubliko).

## KAMPANJO 2000

Nia asocio antaŭvidas la organizon de seminario pri Eŭropo okazonta la 24-an kaj 25-an de aprilo 1999, al kiu ni invitos esperantistajn fakulojn pri Eŭropo kaj la katalunajn eŭroparlamentanojn. Sekvos detaloj en nia venonta revuo.

## FORUMO POR LA ESPERANTA CIVITO

Nia asocio provizore aliĝis al la Pakto por la Esperanta Civito, kion tamen nia Asembleo devas ratifi. La Forumo okazis inter 9-a kaj 11-a de aŭgusto 1998 en la urba biblioteko de la svisa urbo La-Chaux-de-Fonds, kunvokita de Esperanta PEN-Centro kaj Esperanto-Radikala Asocio kaj organizita de Kultura Centro Esperantista.

La Pakto por la Esperanta Civito estas interkonsento kiu engaĝas la subskribintojn al reciproka helpo, al la kreo de komuna kondukmodo pere de arbitracia instanco (kies sidejo estos en Svislando) kaj al la atingo de kelkaj celoj pere de Evolukomisiono (Eko), kies sidejo estos en Romo. Prioritataj celoj estas la agnosko pri nia lingvo kaj ĝia komunmo fare de la "Bureau des langues moins répandues" en Dublino, kaj la preparo de konstitucia ĉarto por instanco por la Esperanta Civito.

## NOVA LIBRO PRI DELFÍ DALMAU

Ĝus aperis la libro en la kataluna lingvo "Poliglotisme i raó. El discurs ecoidiomàtic" kies aŭtoro estas nia amiko kaj kunlaboranto Jordi Solé i Camardons, eldonejo Pagès 1998. La libron vi povas aĉeti en via kutima librovendejo.

## UNIVERSALA DEKLARACIO DE LINGVAJ RAJTOJ

La 6-a de junio 1996, laŭ iniciato de la Komitato pri Tradukoj kaj Lingvaj Rajtoj de la Internacia PEN-Klubo kaj de la Internacia Centro Escarré por la Etnaj Minoritatoj kaj Nacioj (CIEMEN), pli ol ducent homoj el pli ol naŭdek ŝtatoj de la kvin kontinentoj aprobis en Barcelono la Universalan Deklaracion de Lingvaj Rajtoj.

Kunlaboris en tiu Deklaracio ankaŭ la Esperanta PEN-Klubo, ĉar ja la esperantistoj ne povus foresti en tiel grava lingva afero.

Nia asocio celas esperantigi la tekston de tiu Deklaracio kaj tiucele ni serĉas pretan kunlaboranton. Bonvolu vin anonci ĉe nia sidejo je la telefono 93-716.3633 inter 17-a kaj 20-a h. dum labortagoj.

## KEA-ASEMBLEO

Nia ĉi-jara Ĝenerala Membrokunveno, okazos sabaton la **13-an de marto 1999**, laŭ ĉi-aldona kunvokilo. La Plenumkomitato de KEA insiste petas la ĉeeston al ĉiuj siaj membroj, ĉar nur per ilia intereso pri la asociaj aferoj, nia kataluna movado povas progresi kaj firmiĝi cele al pli bona estonteco.



**MAJORKA ESPERANTISTARO**

En nia antaŭa revuo ni forgesis aperigi la interesan foton de la tolaŝio, kiun niaj tieaj gesamideanoj svingis dum la populara surstrata manifestacio okazinta en pasinta majo, favore al la kataluna lingvo. Tion ni faras nun tre volonte kaj petas ke niaj tieaj kolegoj estu komprenemaj pri niaj eraroj.

**TARRAGONA**

Ekde novembro funkcias E-kurso en la loka hospitalo Joan XXIII, laŭ organizo de sindikato CATAK kaj gvido de nia loka aktivulo Joan Marimon, kun partopreno de 10 homoj. Ni deziras al nia membro grandan sukceson.

La liberecana revuo "La Llettra A" (la litero A) kiu eldoniĝas en la urbo Reus, daŭre aperigas E-lecionojn kaj en la lasta numero oktobro/novembro 98 ankaŭ E. estas menciata sur paĝoj 56 (letero de leganto) kaj 83 pri ricevo de nia revuo Kataluna Esperantisto, kiun ni sendas al ili interŝanĝe.

Laŭ la sama fonto ni informiĝas pri la tiea prezentado de la teatraĵo laŭ la nomo "Esperanto" ludata de la profesia ensemblo "Sèmola Teatre". Tamen ĝi tute ne rilatas al nia lingvo nek al ĝia celo, sed almenaŭ tio provokas mencion de nia lingvo vaste kaj publike. ĉu finfine pozitive ?

**BARCELONO**

Sabaton la 24-an de oktobro okazis ĉe Unesko-Klubo la prezentado de la ĵus eldonita broŝuro pri nia pioniro Delfi Dalmau (vidu apartan informon) kun ĉeesto de lia filo kaj ties edzino kaj kvardeko da gesamideanoj. Por tiu evento nia asocio enprogramigis la recitalon de la pola E-kanzonisto Georgo Handzlik (la bardo sen barbo) kiu kun granda simpatio sukcesis eĉ kantigi la ĉeestantojn. Finiĝis la aranĝo kun lunĉo, per kiu la asocio regalis la partoprenantojn.

Por memori la naskiĝan datrevenon de Zamenhof, la Esperanta Fako ĉe Unesko-Klubo organizis la 19-an de decembro vespere la prezentadon de la nova verko de nia elstara verkisto Manuel de Seabra, "Promeso en obskuro". Komenciĝis la aranĝo per bonvenigaj vortoj de Lluís Armadans, gvidanto de la Fako, sekvis interveno de Josep Martinez de Foix, kiu prezentis la aŭtoron kaj la aŭtoro mem prezentis sian verkon. Trideko da geesperantistoj aŭskultis kun intereso la prezentadon.

**SABADELL**

La E-kursoj por 1998/99 komenciĝis la 23-an de oktobro kun partopreno de entute 15 gelernantoj inter la tri kursoj, elementa kun 7, meza kun 5 kaj infana kun 3. Espereble ni sukcesos kapti ilian intereson ĝis la kursfino.

Denove ĉi-jare okazis en la sidejo de CES (Centro de E-Sabadell) la tradicia kaŝtanfesto kun partopreno de entute 23 homoj kiuj inaŭguris la ĵus aĉetitan novan muzikan aparaton, kio riĉigis la feston per tre ĝojiga balo.



# Novajoj el Bosnio

## MALFERMITA HOSPITALO EN TEŠANJ

Grandnombra kataluna delegacio el 46 personoj (urbestroj, politikistoj, ĵurnalistoj, sociaj kaj kultur-agantoj) la 3-an de oktobro 1998 partoprenis en Tesanj solenaĵojn pri malfermo de rekonstruita loka hospitalo. Bazajn monrimedojn por rekonstruo de teretaĝo (nun ambulatorio de urĝa medicino) kaj alkonstruo de la kvara etaĝo (nun departamentoj por internaj malsanoj kaj intensa flegado) disponigis deko da katalunaj komunumoj rekte aŭ tra Kataluna Fonduso por Disvolvo sub lerta kunordigo de la projekto de la Komunumo Santa Perpètua de Mogoda. La projekton surloke fake kaj kompetente realigis bosnia humanitara organizo ESPERO, fondita de E-Ligo de BkH.

La solenaĵoj en Tesanj, kun granda publika reeĥo, havis politikajn, kulturajn kaj humanitarajn aspektojn. En pluraj oficialaj situacioj krom la ĉefe uzataj la bosna kaj kataluna lingvoj, Esperanto ofte efike intervenis. Belega prospekto, speciale eldonita pri finkonstruado de la

hospitalo, sur tuta paĝo raportas pri sukcesa kunlaborado de HO ESPERO en la projekto..

## KRIZANTEMO DENOVE EN BOSNIO

Jam la trian fojon post la milito Kikusima Kazuko (Krizantemo) vizitis Bosnion en aŭgusto 1998 akompanita de esperantistino Jamakawa Setuko kaj du knaboj. Ĉi-jare Krizantemo vizitis ambaŭ bosniajn entojn, la urbojn Sarajevo, Zenica, Mostar, Visoko en Bosnia federacio kaj Banja Luka en bosnia serba respubliko. Por E-organizo en Sarajevo kaj Banja Luka Krizantemo portis gravajn librodonaĵojn de pluraj japanaj eldonistoj kaj verkintoj en valoro de po ĉ. 1000 DEM. En Sarajevo renkontiĝon kun japanaj gastoj en populara sarajeva restoracio partoprenis pli ol 40

sarajevaj esperantistoj. Ankaŭ en Zenica Krizantemo renkontiĝis kun la lokaj esperantistoj.

## “ESPERO” KONSTRUOS AKVODUKTON

Bosnia humanitara organizo ESPERO kontraktis novan projekton, konstruadon de akvodukto en bosnia vilaĝo Klokoćnica en komunumo Dobojo-Oriento en norda Bosnio. La akvodukton, ĝian centran parton, donacas al la loka loĝantaro kataluna komunumo Sant Quirze kun subteno de Kataluna Fonduso por Disvolvo. La konstruotaj objektoj de la akvodukto devus prizorgi kontinuan akvoliveradon por 8000 enloĝantoj. Inaŭguron de konstrulaboroj la 2-an de oktobro 1998 en Klokoćnica partoprenis delegacio de Sant Quirze, urbestroj de kelkaj aliaj katalunaj komunumoj, reprezentantoj de Kataluna Fonduso kaj gvidantoj de bosna kaj kataluna filioj de ESPERO

## BOSNAJ GEJUNULOJ EN LA TEJOKONGRESO

Sub gvido de juna inĝeniero Samir Ribic, nova komitatano de UEA, la 54-an IJK en Rijeka (Kroatio) partoprenis naŭ gejunuloj el Bosnio. Interese ke ĉiuj ili kiel bazlernejoj eklernis Esperanton dum la milito, kaj nun kiel mezlernejoj debutis en la internacia E-movado. Temas pri la plej granda grupo de bosniaj gejunuloj partopreninta TEJOKongreson dum lastaj dudek jaroj.

## SOROS-FONDAĴO SUBTENIS ILEI-VOJAĜON

Lastan Konferencon de ILEI okazinta en Montpeliero partoprenis kiel ILEI-representanto en Bosnio s-ino Nimeta Kulenovic, tradukisto por franca lingvo ĉe bosnia registaro. Interese estas ke ŝian vojaĝon al Francio por partopreni en la ILEI-konferenco finance subtenis direkto de mondfama Soros-Fondaĵo por Bosnio kadre de ĝia eduka programo.



## **ESPERANTO ROLIS EN TRILANDA PROJEKTO**

“REVE 1998” estas siglo de la projekto “Renkonto inter Vi kaj ni” kiun iniciatis franca humanitara organizo “Infanoj rifuĝintoj de la mondo” kaj finance subtenis Asekura kompanio de Le Mans. Ĝi celis dum unu semajno en feriejo Ardeche en regiono Rhona-Alpes kunvenigi po 7 gejunuloj el Francio, Rumanio kaj Bosnio por komuna feriado kaj interkonatiĝo. Iu rememoris ke komunikado povus esti problemo, kaj la asekura kompanio mendis ĉe ĉiuj tri grupoj intensan studadon de Esperanto dum tri monatoj. La bosnia grupo el urbeto Kladanj (meza Bosnio) konsistis ĉefe el rifuĝintoj de martira urbo Srebrenica. Ĉar en Kladanj estis neniu esperantisto, profesoro Mustafa Tandir ĉiusemajne dum tri monatoj vojaĝis al Kladanj de Sarajevo por instrui Esperanton. Ĉiujn vojaĝ-kaj instru-kostojn pagis la Asekura kompanio. REVE 1998 sukcese realiĝis, sed oni ne havas plenan raporton pri funkciado de Esperanto ĝiakadre.

## **FRANCA E-KURSO EN GORAZDE**

Dum la lasta semajno de aŭgusto 1998, en Gorazde (Bosnio) okazis la “Festivalo de Amikeco” organizita de kelkaj bretonaj komunumoj. Pli ol kvardek kultur-agantoj, edukistoj, sociaj agantoj kaj artistoj plenumis multajn programojn en la urbo kaj ĉirkaŭaj vilaĝoj por manifesti simpatian kaj moralan subtenon al la loka loĝantaro tre suferinta dum la lasta milito. Inter aliaj edukaj kursoj en la loka bazlernejo por dudeko da infanoj s-ino Gaby Treanton, akompanita de s-ino Nicole Rizzoni, gvidis E-kurson. Ĝi altiris grandan intereson de aŭtoritatoj ambaŭflanke. Oni jam interkonsentis ke la festivalo ripetiĝu ankaŭ dum sekvonta jaro, sed ke la E-kursoj komenciĝu minimume tri semajnoj pli frue en Gorazde kaj por bretonaj partoprenantoj.

## **BOSNIAJ INFANOJ EN KONGRESO DE SAT-AMIKARO**

Kvin bosnaj E-infanoj el Praca (kantono Gorazde) kun ilia instruisto-esperantisto Bego Ligata estis specialaj gastoj de la lasta kongreso de SAT-Amikaro okazinta en Saint Briec meze de majo 1998. Krom partopreno en la Kongreso la infanoj

vizitis Parizon kaj kelkajn aliajn bretonajn urbetojn. La vojaĝon organizis s-ino Nicole Rizzoni dank'al subteno de fondaĵo ESPERANTO -SOLIDARECO funkcia kadre de SAT. Interese ke la infanoj komencis lerni Esperanton ĉe s-ino Rizzoni okaze de ŝiaj tuj postmilitaj vizitoj al Bosnio kun la celo varbi internacian helpon por rekonstruado de Bosnio.

## **PERESPERANTA DONACO**

Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj kaj Itala Blindul-Unuiĝo donacis al Porblindula Lerneja Centro de Bosnio kaj Hercegovino elektronan aparataron por produktado de brajlaj libroj. Dum solenaĵo okazinta la 29-an de aŭgusto 1998 en Sarajevo la aparataron transdonis Aldo Grasini, esperantisto el Ancona. La tuta projekto rezultiĝis el esperantista iniciato reage al la tuj postmilita alvoko de prof. Branko Miljko, tiama direktoro de la komplete detruita Centro por subteni ĝian rekonstruadon.

## **NOVAJ KURSOJ EN SARAJEVO**

Kun la nova lerno-jaro startis jam kvar E-kursoj en sarajevaj elementaj lernejoj. Instruisto Smail Grbo gvidas unu klason en la lernejo “Pofalici” por 30 lernejoj, kaj gimnaziano Dzenita Zvirac (18) por 20 infanoj en lernejo “Camil Sijaric”. En lernejo “Osman Nakas” okazas du por-komencantaj kursoj kiujn por sume 50 lernejoj gvidas gimnazianoj Vildana Delalic (16) kaj Naida Katica (16). Interese estas ke antaŭ tri jaroj la du instruistoj estinte bazlernejaninoj en la sama lernejo komencis lerni Esperanton en la kurso de Azra Colic. Krome en la lasta lernejo okazas supera E-kurso por 15 finintoj de pasintjaraj konversaciaj kursoj.

## **STRATNOMO LAŬ ESPERANTISTO**

Unu el stratoj en Sarajevo ricevis nomon de Kasim Hadzic (1917-1990), siatempe gvida islama intelektulo kaj fervora esperantisto. Hadzic, depost esperantistiĝo en 1958, tre aktive partoprenis en la bosnia E-movado. Li gvidis multajn E-kursojn, precipe en medreso (islama mezlernejo) kaj kunlaboris en pluraj E-gazetoj. Pro kontribuo al disvastigo de Esperanto li ricevis plej altajn rekonojn de la E-movado kaj Memor-plakedon de la urbo Sarajevo en 1975.



## NORVEGO PRELEGIS PRI BOSNIA ISLAMO

Pro studvojaĝo Bosnion denove vizitis norvega studento Christian Moe, nun loĝanta en Slovenio. Antaŭ dudeko da sarajevaj esperantistoj la 21-an de novembro 1998 li prelegis pri ĉefa temo de lia magistriĝa disertaĵo "La debato en la bosnia islama komunumo 1985-1991". Post vigla diskuto kun la aŭskultantoj pri la temo, Moe respondis plurajn demandojn pri stato de la E-movado en Norvegio kaj Slovenio.



## EL AŬSTRALIO KUN SIMPATIO

El tiulanda radia E-programo en Melburno ni ricevis tre simpatian poŝtkarton kun danko pri la de ni eldonita revuo "Bosnia Lilio", kies enhavon ili promesas disradii kaj samtempe ili gratulas nin okaze de la Nova Jaro. Ni dankas kaj reciproke sendas al ili niajn sincerajn bondezirojn por 1999.


## INTERNACIA E-STAĜO EN GORAZDE (BOSNIO)

Bretona solidara E-Grupo kun Bosnio celas organizi internacian E-staĝon en Gorazde aŭguste 1999, se sufiĉaj homoj interesiĝas. Ili eldonis tre belan poŝtkarton plurlingvan kun kortuŝa mesaĝo: Gorazde: Ni ne forgesas vin!  
 !. Interesitoj povas sin turni por pli detala informado al s-ino Gabrielle Tréanton- 25 rue de l'Eglise F-22700 S'QUAY PERROS

## HELPOKRIO EL UKRAINIO

Sur tiu ĉi foto vi vidas la ĝemelajn knabojn, junajn esperantistojn Oleg kaj Nazar Vovk el Ukrainio. Unu el ili Oleg (dekstre) estis ĵus operaciita pro grava difekto de la koro. Sacante la vivon de la knabo (la operacio estis tre multekosta), lia familio restis sen ajnaj vivrimedoj. Pro neimagebla ekonomia krizo kaj inflacio en Ukrainio ĝi ne povas ricevi helpon de la ŝtato aŭ landaj karitataj organizoj. Mizera salajro de la gepatroj malebligas pluan kuracadon kaj reŝaniĝon de la operaciito kaj aĉeton de necesaj medikamentoj.

Lige kun tio Esperanto-Centro en la urbo Drohobiĉ, Ukraina E-eldonejo "Bona Koro" sin turnas al ĉiuj karitatemaj homoj kun peto helpi resanigi Olegon Vovk!. Ĉia financa helpo, eĉ modesta, estos danke akceptita. Samtempe ni petas ne taksi nian alvokon kiel arogan altrudon aŭ krudan postuladon. Helpi aŭ ne, dependas nur de via bonvolemo kaj karitato!. Anticipan dankon pro via bonkoreco! Monoferojn vi povas sendi al nia UEA-konto: ueeq-t.





## Feliĉan Novan Jaron !

Kiel filo de kamparanoj li amis sian teron; sed la grundo estas tiel malalta kaj la fosilo tiel peza... Vere doloris ofte al li la lumbopro la konstanta kurbiĝo. Tie brilis gaje, bele la suno, sed ĝi rostas la dorson kaj preskaŭ ŝveligas la kapon per siaj varmaj penetraj radioj. Surkampe estas tre pura aero, sed ofta ventado necesigas rezistemon, kvazaŭ koleran teniĝon. Ĉe urbanoj ne vivas pli oportune? Ne en koto ili paŝas, sed sur pavimitaj stratoj kaj vole aŭ bezone ili uzas veturilon. Urbanoj ĝenerale vivas en artefarita klimato, for de la natura akreco.

Tiaj konsideroj naskis al li ideon: Iri en urbon, resti tie, urbaniĝi; sed kiel? Pense li alparolis ĉiun konaton, kies enurba rolo povus helpi lin per aŭtoritato aŭ influo. Li traesploris la eblajn oficojn: tramisto, poŝtisto, rubisto... La lasta ankaŭ kurbigas la dorson pro la senfine levataj rubujoj. Facile li imagis, ke la unua povas kaŭzi akcidentojn, do tro danĝera. La meza ŝajnis al li la plej taŭga. Ĉu li mem ne ŝatas ĉasadon, do longan paŝadon? Kio do pli bona por li ol esti poŝtisto, en la fako de leterportado? Iri en uniformo surstrate de domo al domo, liveri al iu fraŭlino sopiratan letereton de ŝia amato kaj eventuale ricevi trinkmonon pro tiel favora cirkonstanco, ĉiam iri stare kiel decas al homaj homoj, ne kurbiĝe kiel perfekta urso... Post la ideo venis la decido. Li planis al sia edzino: 'Mi skribu al S-ro Komandanto kun kiu mi servis kiel soldato; videble li ŝatis min. Vi skribu al Moŝta Episkopo, vi ja estis longe ĥoristino en la preĝejo!'

Kiel fariĝis? Neniam li povis scii kies estis la helpo, sed li jam estas poŝtisto, disportas leterojn, traktas afable la personojn, kaj ... estas ĝoja. Laŭkutime, ĉiujare okaze de la tradiciaj Jarfinaj Festoj, la publikaj funkciuloj prezentas bondezirojn al rilatataj personoj. Ne estas dubindaj iliaj bonaj sentoj, sed la celo estas alia: ricevi gratifon ankaŭ kutime donatan. Tiel nia poŝtista familio-geedzoj kaj filineto- ricevis

sume kroman monatsalajron.

Tiel sukcesa jarfino malfermis helan horizonton antaŭ Nova Jaro. 'La vivo renoviĝas, ni renovigu la nian!' ili diris al si, kaj rigardante la murojn de sia loĝejo-modesta, surtera apartamento- ili rimarkis ke la tempo forviŝis la kolorojn; ke kelkaj ornamaj kurtenetoj jam flavetiĝis; ke mankas pentraĵetoj surmure por lukse agrablighi la aspekton; ke la tableto de la filino (donacata de la avino) estas ekstermoda, pratempa... La plano estis preta koncerne la hejmon sed ne koncerne la korojn. Estis necese festi kaj prifesteni la unuan tagon de la jaro, la stafeton de la renoviĝo; celebri la feston gaje kun parencoj aŭ amikoj; danci, danci, trinki kaj maldormi.

Tiu proverbo, laŭ kiu "Inter diro kaj faro estas granda baro" estis tute ne efika. Haste oni pentris la apartamenton, la edzino ŝanĝis la kurtenojn, aĉetis novan tableton por la filino, reordigis ĉion en la ŝrankoj, frotis la meblaron ĝis briligis, ĉion senpolvigis kaj novaj kadritaj bildoj jam pendis sur la muroj. Antaŭ Nova Jaro decas renovigo, ne nur en hejmo sed ankaŭ en koro... la edzo prezentis al ŝi donacon: vazon kun bela bukado el artefaritaj floroj, kiel simbolon de nevelkonta amo.

Al kalendara arbo restis nur unu folio: 31-a de decembro. Por tiu transira punkto estis aranĝita Granda Balo en riĉula societo La Progreso. 'Ni invitu mian fratinojn, ŝi diris, kaj ankaŭ mian kuzinojn.'

'Jes ja!' li respondis. Ĉar tiuj fraŭlinoj loĝis ekster la urbo, estis necese antaŭprepari por ili liton. La edzino serĉis solvon, ĉar kroman liton ŝi ne havis. La fraŭlinoj dormu en nia granda lito, la edzo kaj mi en tiu de la filino, la filino mi gastigu ie, ĉe najbarino; ĉu mi ne trovos bonvoleman sinjorinojn, kiu gastigos mian filineton dum unu sola nokto por ke ni festu la venon de la Nova Jaro?



Sed matene en la feliĉa projekto aperis nubeto. 'Mi ne sentas min bonfarta' diris la edzino. 'Ŝajnas ke la gripo nun tiel vastiĝinta tra la urbo venis al mi...' Sed, ĉar turmentis ŝian koron la penso, ke tial ili devus resti hejme, ŝi volis supozi ke eble tio estas nura malvarmumeto. Tial ŝi iris senhezite al apotekisto.

'Jen piloloj, sinjorino, kontraŭ grupo, malvarmumo, kapdoloro, febro... Glutu po du, unu ruĝan kaj unu verdan, trifoje en la tago. 'Kurioze ! ŝi diris baldaŭ. 'Jen mi fartas bone, ni povos festi. Mi iras telefoni al mia fratino.'

Vespere la fraŭlinoj jam venis. Kune ili manĝis kaj ĉampano gajigis ilin.

'Ĉu vi estas pretaj por la Granda Balo?' diris la edzo.

Sed la fraŭlinoj ne iras iel ajn al dancejo. Ili trarigardis sin de haroj ĝis ŝuoj ĉar ili bone scias, ke balo estas ia foiro, kie valoras gracio pli multe ol mono. Ne estas strange do, ke ili rimarkis jupan ĉifaĵon.

'La gladinon, fratino, por momento mi petas...' kaj lastmomente la fraŭlinoj gladis la jupon, dum la hormontriloj rapide avertis, ke estas jam tempo iri al La Progreso por honore akcepti la Novan Jaron.

'Ĉu vi estas jam pretaj?' rediris la poŝtisto.

'Tuj, tuj!' Ili haste surmetis la jupon kaj kune preskaŭ kurante iris al la Societo. Dume, la elektra gladilo restis en la ĉambro, mallume, sur la nova ĵus aĉetita tableto de la knabino. En la granda salono de La Progreso eksonis orkestro trenanta la ĝojulojn al turniĝado. El trumpetoj eliĝis orelŝiraj sonoj, el tamburoj ritmiga taktado, el violonoj dolĉa invito al balanciĝaj movoj.

'Feliĉan Jaron!!' ekkris iu en la salono...

'Feliĉan Jaron!!' ĥore respondis la ĉeestantaro.

La horloĝaj manetoj preterpasis ronde kaj rapide la ciferojn. Feliĉa vivo estas mallonga. La tempo flugis ne rimarkate en la kapturna moviĝado de la bruanta salono, kaj ankaŭ flugis en la senbrua ĉambro, kie forgesite kuŝis la neaŭdeble kraketanta kaj plu varmiĝanta gladilo.

'Bonan Jaron!! Feliĉecon al ĉiu!!'

La gladilo tute ruĝiĝis. Ratoj en silento ronĝas per dentoj, kaj la gladilo, sendenta 'aparato', ronĝis per fajro. Fume karbiĝis la supra tabulo de l' tableto. Iom post iom la ardaĵo prosperis. Karbiĝis la tuta tableto, plena libroteko de la knabino, la karbigeblaj partoj de knabina biciklo: selo kaj kaŭĉukaj radoringoj. Densa nigra fumo torente elfluis el la ĉambro. Brulis fleksebla tablolampo, brulis tolaĵo, brulis surmure pendantaj pentraĵoj, brulis eĉ la brila gladilo, kiés tenilo vaporiĝis, kies elektra ŝnureto brulinte kontaktigis la fadenojn kaj ĉesigis la kurenton. Ĉesis la kurento sed ne la fajro. Ankaŭ ne la homa svarmo en la salonego, kie varmigite de varmo kaj vino kaj ardaĵ deziroj kirliĝadis homaj paroj ĝojantaj pri la pasintaj tricent sesdek kvin zorgoj kaj dezirantaj tricent sesdek ses feliĉaĵojn al si reciproke. Paralele kirliĝadis ankaŭ la kvarobla fumo de ligno, de ledo, de ŝtofo kaj kaŭĉuko. La fumnubego plenigis la tutan loĝejon, nigriĝis la novigitaj muroj, nigriĝis la reaĉetitaj kurtenoj, ankaŭ la mebloj. La fumo enpenetris la ŝrankojn kaj grase-nigre malpurigis ĉion.

'For la zorgojn!! Vivu la Feliĉeco!!' plu sonis en la salono. Longe post noktomezo daŭris la festado. Preskaŭ senĉesa dancado, huraoj al Nova Jaro, longaj interbabiloj kaj maldormado lacigis ilin. Antaŭkrepuske -ĵus sonis la kvina horo- ili reiris hejmen. La gladintaj fraŭlinoj, tiel lerte, senĉese dancintaj kun galantuloj, mense vivadis dum reveno la bildojn de la kundancintoj. Jam antaŭ la pordo, ili ne povis



rezisti la penson: 'Tiu junuloj estas tre elegantaj, ĉu ne vere?' ili diris.

La poŝtisto ĵus enŝovis la ŝlosilon, ŝaltis la lumon, sed vane, lumo ne fariĝis, kaj haladzo plenŝtopis al li la nazon. Sub la ekscitaj impresoj de la festo li ne sciis ĝuste kompreni la kontraston. Kio okazis? Kvazaŭ blindulo li palpante eniris antaŭsentante katastrofon. Lia koro apenaŭ batis, li apenaŭ spiris. Ĉu fajro? Tamen, flamojn li ne vidis. Iel li lumigis al si, kaj vidis...ĉion, kion vi jam scias!

La edzino plorĝemis kaj svenis; la fraŭlinoj ekploris, la edzo eksplodis kolere, 'Jen, vi, senzorgulinoj, vi ne malŝaltis la gladilon; en via kapo loĝas birdido! Vi nur scias memori la bildojn de viaj galantuloj!'

Tia ofendo incitis ilin, kaj tiel gaje kunfestinte ili komencis reciprokan parolatakadon per insultoj paralele kreskantaj ĝis la plej fia esprimo. Dume la edzino rekonsciiĝis kaj provis eviti propran kulpecon, 'Ja, ŝajnis al mi, ke ni devis resti hejme. Mi ne fartis tute bone, sed por komplezi vin ...'turnante sin al edzo, 'mi ĉiel penis...'

'Fripona edzino! Ke vi ne deziris festi? Kiu do ĉion aranĝis? Kiu iris telefoni kaj inviti viajn fratinojn kaj kuzinojn?'

Forgesinte la donacitan florbukedon, kiu simbolis nevelkontan amon, li sakre murmuris al ŝi ĝis ankaŭ ŝi ellasis malbenojn, ĉar ĉu ne li planis la feston

Je tagmezo venis al ili la avino.

'Jen kara panjo, diris la edzino intencante ricevi ian onhelpon, 'kiel ĉio nigriĝis, kiel forbrulis la tableto, la portreto de nia filino, la...

'Silentu jam ...kion do vi babilas? diris la avino. 'Ĉu vi mem ne estas plej kulpaj? Vi meritis multe pli. Por kio taŭgis mia ekzemplo? Bonaj, decaj geedzoj nokte restas hejme kaj ne aspiras mondumecon. En via aĝo, ĉu vi estas birdidoj? Kia moralo, nuntempe, en nia tempo tio ne

okazis!!'

Riproĉate, neniuj estas kontenta, ankaŭ ne ŝi. La edzino penis pravigi sin, sed tial plikoleriĝis la avino, kiu seve duobligis la riproĉon, antaŭvidante en sia penso tutan forbrulon.

La filino abrupte respondis. 'Estas bedaŭrinde, patrino, ke vi venis. Por tio ni ne bezonis vin. Iru jam hejmen!'

La poŝtisto staris malserene apud la pordo surstrate, celante liberiĝi de la internaj impresoj. Lia mieno klare montris ke gravaj zorgoj okupas lin. Li estis silenta, senmova, fiksrigarda. Sur lia modesta ekonomio estis tre grava perdo la brulaĵo, sed ne tio maltrankviligis lin. Frostan traskuon li sentis pro la penso, ke katastrofo estis preta! Se ili estus lasintaj la filinojn hejme, ŝi estus jam sufokita de la fumo! Se pro nura venteto enpenetrus aerfluo, fajraj flamoj cindrigus la hejmon, la domon kaj verŝajne ankaŭ la infanon! Poste, sen hejmo, sen filino, sen mono kvazaŭ krimulo...Kia kontrasto! Ĵus ni ĝoje dancadis, nun, mi baraktas kontraŭ la Morto, kaj ...

Poŝtisto...Poŝtisto! Bonan, feliĉan Novan Jaron! alvokis gaja najbarino preteriranta...

'Jes..bonan...kaj...feliĉan...'

Salvador Gumà





## SUR PARNASO

**Timothy BRIAN CARR. Poemoj. Serio Stafeto, n-ro 21. 119 paĝoj. Eldonis: Flandra Esperanto-Ligo.**

Delfi Dalmau, en sia ĉsea libro "Dialekto, Dialektiko", konjektis ke "se dum la lastaj cent jaroj aperis multaj provoj por internacia lingvo, kaj nur Esperanto atingis grandan movadon, tiu fakto kredigas ke nur Esperanto estas bona, la sola internacia lingvo kiu naskiĝis poezie (...) kaj poezie renaskiĝis."

Dalmau tion diris memorante la praesperantan komencan version 'Malamikete de las nacjes', kaj tiun pli postan 'Forte staras muroj de miljaroj', kaj, supozeble, pri la unuaj poeziaĵoj de Zamenhof, La Vojo, Ho mia kor', Preĝo sub la verda standardo, i.a., kaj tiujn fruajn de Antoni Grabowski.

La esperantlingva poezio, dum pluraj jardekoj, daŭre restis muldita, aŭ fasonita, kun tro da skema simpleco, kaj, stile, laŭ beletra influo de jam iom forpasinta romantikismo, eble pro nepra manko de tradicio en tiu ĵusa naskiĝanta lingvo.

La liberversa verkado, kiu estis eltrovo, aŭ elpensado, de francaj poetoj, romis ĉiujn ŝablonojn antaŭajn, sed en Esperanto oni persistadis laŭ la iamaj formoj kaj elvokfortaj konceptoj kliŝaj. Nur tro malfrue la esperanta poezio malrapide renoviĝis. En la nuno, novaj poetoj kiel

Miguel FERNÁNDEZ MARTÍN, inter elstara aro, verkas samrange al plej renomaj naciaj poetoj

Legante kun streĉa atento kaj vera ĝuo la poemlibron "Sur Parnaso", de la Florluda Majstro Timothy BRIAN CARR, mi konstatis, i.a., la jenon: ke la aktuala esperanta poezio, pro la eblecoj de la senfinpova kreaĵo zamenhofa, povas kunligi kaj la klasikecon kaj la plej atingopovajn modernajn esprimojn lingvajn je la servo de la plej rafinita intelekta spekulativeco.

Brian Carr alprenis en sia poemaro plej abunde la sonetan formon. Ho la soneto, kiu, preskaŭ mirakle, transsaltis de la mezepoko ĝis la nuno seninterrompe! Kial, do, tiu transcenda povo kontraŭ la efemereco de konstante aperantaj novaj formoj?

Tiu fiksforma poemo, la soneto, konsistanta el du verskvaroj kaj du verstrioj, kaj laŭ tre specifa skemo rima, hipoteze ekaperis en lando de trobadoroj, sed ĝi sankciiĝis praktike inter la skoloj siciliana kaj toskana. La nomoj de Lentini, Pier della Vigna kaj Guittone d'Arezzo estas proponataj kiel plej eblaj adoptantoj de tiu nova memstara poemkomponaĵo kaj fiksantaj ĝian formon. Sed, preskaŭ tute certe, estis Francesco Petrarca, la fama poeto de la "dole stil nuovo", kiu per, i.a., siaj sonetoj al Laura definitive elbenis la soneton.

Post sepcent jaroj - oh mirinde! - la sonetoj tute ne eksmodiĝis, ĉar ili restas tiel taŭgaj kiel antaŭe je la servo de la poetinspiro en la nuntempo, malgraŭ ĝia klasika deveno. Sed nur malfrue la soneto estis uzata de la esperantlingvaj poetoj, supozeble pro la malfacileco ĵongli per ĝia postula rima interplektado. Sed T. Brian Carr ne timis rompi tabuojn. En kataluna lingvo la soneto estis majstre adoptita, i.a., de Carner, Arús, Riba, Foix.)

"Sur Parnaso" prezentas al ni plej varian temaron, laŭ uzado virtuoza de la soneto, super tekniko kaj arta kapablo esprima, ĉar ĉio ĉi efektiviĝas pro profunda kono leksikona kaj elstara poeta lirika sento.

Brian Carr, plurfoje laŭreata poeto, sukcesas, en "Sur Parnaso" transformi la realon en superrealon. La temaro estas plejvaria kaj kontrasta, sed profunde homa, do kun tre persona filozofiado ĉiutaga laŭ valoroj pri vero kaj libereco, senĝene kaj trafe esprimitaj metafore, sed ne kaprice, malgraŭ la devigoj teknikaj, kiuj ne senigas la aŭtoron je ĝusta kaj spontana esprimado poezie altfluga.

Jen vere grava poemlibro kiu postulas al ni atentan legadon por profitdona meditado, kaj, samtempe, por admiri je nia profito lian riĉegan scipovon lingvan.

G.MORA i ARANA

**Feliĉan Novan Jaron 1999! KEA deziras al ĉiuj siaj membroj kaj kunlaborantoj**